

LA PONTO

Dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (LEA)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.
Jarkolekto 1, N-ro 2: julio-aŭgusto 2008
Redaktoro: Pieter Jan Doumen Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel
Tel. 011-73.30.47 – Retadreso:
pieter.doumen@skynet.be

Redaktore..

Kara Legant(in)o, vi certe estos surprizita kiam vi ricevos tiun ĉi duan numeron de 'La Ponto'. Kontraŭe al mia origina intenco ne sendi numeron por la monatoj julio kaj aŭgusto, la estraro decidis ke ankaŭ dum tiuj ĉi somermonatoj estas grave gardi kontakton kun vi. Tial do...

Al ĉiuj membroj de LEA ni kompreneble sendas nian revuon kiel eble plej retpoŝte. Sed ĉar ne ĉiuj Limburgaj esperantistoj disponas pri la interreto, ni devas sendi ĝin al ili per la normala poŝto.

Tial mi sendis, kune kun la unua numero de nia revuo, al 'De Post' en Bruselo la peton povi profiti de la tarifo de la revuoj. S-ro Hilaire Devlamynck, direktoro de la 'Service Centre' respondis, ke lia servo ekzamenis la peton kaj juĝas, ke nia revuo plenumas la kondiĉojn por povi apliki la pli malmultekostan revutarifon. Unu el la kondiĉoj de la Belga Poŝto estas, ke la titoloj de la artikoloj estu tradukataj en la Nederlandan, kion ni volonte akceptas.

Al ĉiuj esperantistoj kaj iliaj familianoj mi deziras, nome de la estaro de LEA, sunecajn, malstreĉajn kaj ripozigajn feriojn!

Vorto de la prezidanto

(Woord van de voorzitter)

Karaj Geamikoj,

Kiel ni promesis ĉe la starigo de LEA, jen nia propra revuo, kies dua numero nun aperas. Mi dankas nian sekretarion Jan pro lia preteco redakti nian modestan revuon, kiu, mi esperas, plaĉas al vi.

Sed kial tiu nomo, 'La Ponto'?

Kiel vi eble scias, en la jaro 1991-a estis starigita la Esperanto-Klubo de Peer sub la kupolo 'Limburga Esperanto-Ligo' (LEL),

kiu jam kunigis la klubojn de Hasselt, Genk, Beringen kaj Houthalen-Helchteren, kaj estis sekcio de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL).

La klubo de Peer tiam eldonis revuon kun la nomo 'La Ponto', ĉar ponto estas trafa simbolo de rimedo kunigi homojn. Ponto ebligas transiri riveron kaj tiel kunigas ne nur ĝiajn du bordojn kaj sed ankaŭ la homojn kiuj loĝas sur ili. Tial ni reprenis tiun nomon por nia revuo.

Ankaŭ Esperanto estas ponto inter la diversaj lingvoj kaj popoloj. Esperanto luktas kontraŭ ĉiujn formojn de maljusteco kaj tiel volas kontribui al pli bona kaj paca mondo. Mi esperas, ke ĉiu esperantist(in)o funkcias kiel ponto al pli bona interkompreniĝo kun la homoj kun kiuj li / ŝi rilatas.

*Amuzan legadon kaj tutkorajn salutojn,
Henri Schutters, prezidanto.*

Universala Esperanto-Asocio centjara (100 jaar Esperantowereldvereniging)

En tiu ĉi jaro U.E.A. festas la centan datrevenon de sia starigo, kio estas okazo por skribi kelkajn liniojn pri ĝia historio.

Jam dum la unua universala kongreso en Bulonjo-ĉe-Mar (1905) D-ro Zamenhof, la kreinto de Esperanto, proponis fondi mondvastan Esperantan asocion, sed la organizantoj rifuzis subteni la ideon. Ili volis nur sendependajn naciajn asociojn.

Du junaj Ĝenevaj amikoj, Hector Hodler kaj Edmond Privat, kiuj ĉeestis la kongreson, komprenis la neceson de tia internacia asocio. Nur tri jarojn poste – la 28-an de aprilo 1908 - Hector Hodler, tiam nur 21-jara, fondis en Ĝenevo la neŭtralan Universalan Esperanto-Asocio. Li volis kunigi ĉiujn esperantistojn por la sama celo – la praktika aplikado de la idealoj de Zamenhof. La asocio konsistis nur el individuaj membroj kaj estis neŭtrala. En 1914 ĝi jam nombris 7000 membrojn kaj plenumis ĝis tiam 45.000 praktikajn servojn per sia delegita reto. Hodler estis konvinkita, ke la sento de solidareco inter ĉiuj teranoj kreskos en la 20-a jarcento. Tial UEA devis esti modelo por la estonta mondo.

La Unua Mondmilito ŝajnis kontraŭdiri tiun idealon kaj strebadon, sed ekde la

neŭtrala Svisio UEA daŭrigis sian agadon kaj realigis ĉiujare pli ol 100.000 servojn.

Kun la starigo de la Ligo de Nacioj post la milito, la kreo de nova mondordo ricevis novajn ŝancojn, de kiuj UEA volis profiti. Hodler bedaŭrinde jam mortis en 1920, sed lia amiko, Edmond Privat kampanjis rekte en la Ligo de Nacioj por la mondvasta rekono de Esperanto. La Franca deligito, timante konkurencon por sia lingvo, malsukcesigis la projekton.

Privat estis prezidanto de UEA de 1924 ĝis 1928. De 1920 ĝis 1934 li redaktis la revuon *Esperanto*. Li estis fama ĵurnalisto kaj eĉ amiko de Mahatma Gandhi.

Por kontraŭstari la grandan influon de la supernacia UEA, la naciaj societoj kuniĝis en la Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj. Por reguligi siajn reciprokajn rilatojn KRNS kaj UEA fondis kune la Internacian Centran Komitaton de la Esperanto-Movado (1922), kiu decidis pri la okazigo de la Universalaj Kongresoj kaj organizis internaciajn fakajn kongresojn, kie Esperanto ofte estis la sola laborlingvo. La konata Rumana pastro kaj esperantisto Andreo Cseh fariĝis ĝia sekretario. Vojaĝante tra Eŭropo li sukcese instruis Esperanton laŭ sia rekto metodo.

Sed multaj laboristoj kaj progresemluloj, kiuj ne ŝatis la neŭtralecon de UEA aliĝis al la Sennacia Asocio Tutmonda (SAT), fondita de la Franco Lanti. Sekve de tio kaj de la forta naciismo UEA perdis multajn membrojn al SAT. Krom tio, la financa stato de UEA fariĝis tre malbona, kvankam ĝi ankaŭ fariĝis federacio de la landaj asocioj en 1933. La nova Prezidanto de UEA, Louis Bastien, devis enkonduki rigoran ŝparadon. En 1936 la Komitato de UEA decidis transporti la sidejon al Heronsgate apud Londono, kie la vivkostoj estis malpli altaj ol en Svisio. Tiam la internaj malakordoj kondukis al skismo. Pro la rifuzo de la Svisaj membroj aprobi tiun translokon, oni decidis en Londono fondi novan asocion, la Internacian Esperanto-Ligon (IEL). La granda plimulto de la membroj kaj landaj asocioj aliĝis al ĝi, dum UEA, forte reduktita, plu ekzistis en Svisio. *(Daŭrigota) J.D.*

Novajoj el Esperantolando

(Nieuws uit Esperantoland)

1. La Pola Parlamento solene omaĝis la 100-an datrevenon de la kreo de UEA. *“Esperanto ligas la homojn en riĉa kaj valora kulturo, kies fundamenta mesaĝo estas internacia amikeco kaj universala paco”*, substrekis la deputitoj en sia unuanime proklamita rezolucio. Ili emfazis la strebadon de la daŭrigantoj de la laboro de d-ro Zamenhof, *“kiu, kreante la lingvon Esperanto, deziris certigi al ĉiuj homoj la eblecon de reciproka kompreno sendepende de nacieco, raso, religio kaj mondkoncepto. La Pola Parlamento, dezirante omaĝi la kontribuon de d-ro Zamenhof al la monda civilizacia heredaĵo, subtenas la klopodojn de la internaciaj amaskomunikiloj por ke UEA estu honorita per la Nobel-premio pri Paco”*. *(Barbara Pietrzak, Pollando)*

2. La Esperanto-Wikipedio nun havas pli ol cent mil artikolojn. Ĝi estas la 20-a lingvo kiu atingis tiun kvanton. La cent mila artikolo, kiu pritraktas la temon ‘monfalrado’, aperis la 15-an de junio 2008.

La diverslingvaj versioj de iu ajn artikolo estas inter si ligitaj sur la unuopaj artikolpaĝoj. Tial la cent mil artikoloj en Esperanto signifas ankaŭ kelkajn centmilojn da mencioj de la vorto ‘Esperanto’ en alilingvaj versioj. Tiel ĉiu artikolo verkita en Esperanto povas vekii intereson pri la lingvo, precipe ĉe la lingve interesataj Vikipedio-vizitantoj. *(Lu Wunsch-Rolshoven, Germanio)*

3. Raporto de la Brazila Aviadila Armeo agnoskis ke la malbona regado de la Angla povas kaŭzi veran riskon de akcidentoj. La raporto aperis la dimanĉon 15-an de junio 2008 en la granda Brazila ĵurnalo ‘O Globo’ (La Globo) sub la titolo ‘Manka kono de la Angla en aviado’. La raporto de BAA atentigas pri la nekompetentecon de la flugkontrolistoj por ilia tasko kaj mencias, ke inter 2003 kaj 2007 okazis 10 aviadilaj ‘incidentoj’, kies kaŭzo estis la malbona kono de la Angla. Inter la aranĝoj faritaj por solvi la problemon estas pli bona distribuado de la malmultaj flugkontrolistoj por certigi, ke almenaŭ unu homo kapablu paroli la Anglan en la kontrolcentro. *(Emilio Cid, Brazilo)*

4. La Instituto Zamenhof (Togolando)
jam estas preta alfronti la jarfinajn ŝtatajn kaj Esperantajn ekzamenojn. En junio 2006 ĝi unuafoje en la historio prezentis kandidatojn al la ŝtata ekzameno ĉe la fino de la studo en la mezgrada nivelo. Tiam ĉiuj dudek kandidatoj sukcese trapasis ilin. La postan jaron 80% de ĝiaj kandidatoj estis sukcesaj.

En tiu ĉi jaro ĝi prezentos kandidatojn al du ekzamenoj: tiuj de la elementa kaj meza niveloj. IZ havas 14 gelernantojn en la lasta klaso de la elementa nivelo. Ili ĵus trapasis du provekzamenojn. En la ekzamenoj partoprenis 14 lernejoj. Nur IZO havis sukceson de 50%, la aliaj havis inter 0 kaj 33% da sukcesintoj.

Ĉiuj 28 gelernantoj de la lasta klaso de la mezgrada nivelo partoprenis en la provekzamenoj kun siaj kolegoj de sep aliaj lernejoj. Por la unua ekzameno estis 271 kandidatoj. Sukcesis nur 23, kaj inter ili estis 11 IZ-anoj. Por la dua ekzameno estis 265 kandidatojn. Sukcesis ankaŭ 23 kandidatoj, inter kiuj 16 IZ-anoj. En la tria partoprenis entute 397 kandidatoj el 9 lernejoj. Inter la 29 sukcesintaj kandidatoj IZ prenis 10.

Ĉe la malfermo de IZ en 2004 startis Esperanto-kurso por la gelernantoj de la unua klaso de la mezgrada nivelo. Multaj el ili sukcesis en la ekzameno A de la Esperanto-Instituto de Togolando. En julio 2006 iuj el ili diplomiĝis en la nivelo A. Unu jaron poste iuj el ili sukcese trapasis la elementan ekzamenon de UEA-ILEI.

Ankaŭ en tiu ĉi jaro okazos diversaj ekzamenoj. Tuj post la fino la lerneja jaro gelernantoj de IZ trapasos la elementan kaj mezan Esperantajn ekzamenojn de UEA-ILEI kaj la ekzemojn A1 ĝis B1 laŭ KEFR. (*Gbeglo Koffi, Togolando*)

Niaj renkontiĝoj...

(*Onze ontmoetingen...*)

1. Renkontiĝo de la 15-a de majo

(*Ontmoeting van 15 mei*)

Tiun ĉi vesperon 8 (ok!) ĉeestantoj venis al Peer por aŭskulti la prelegon de Jan Doumen. La titolo de lia prelego estis: “Kie iam situis Trojo”.

Ĉiuj konas la eposojn de Homero: la “Iliado” kaj la “Odiseado”. Sed kie vere okazis tiuj rakontoj?

Jan komencis per la historio de Homero kaj donis plurajn argumentojn por kontraŭdiri, ke Trojo troviĝis sur la monteto Hisarliko en la okcidenta Turkio. Oni certe scias, kiam la dekjara milito en Trojo okazis, sed oni ne scias, kie Trojo troviĝis. La tempon kiun Homero priskribis estas la bronza epoko. Do oni devus trovi tie bronzaĵajn milit-armilojn.

La kialo por la dekjara milito en Trojo ne estas kredinda. Kial la Trojanoj akceptis, ke Pariso rabis la edzinon de malamiko? Ili ja sciis, ke tio kaŭzos militon... Ne eblas, ke la tiamaj loĝantoj de Grekio partoprenis en tiu milito.

La monteto Hisarliko ankaŭ ne estas sufiĉe granda por la 100.000 loĝantoj de Trojo, nek la ebenaĵo antaŭ la urbo por la multaj riveroj. En la ĉirkaŭaĵo de Grekio oni ne povas retrovi la multajn geografiajn nomojn kiujn Homero uzis.

La dua parto de la prelego de Jan estis bazita sur la libro “Waar eens Troje lag” (Kie iam situis Trojo) de Imam Jacob Wilkens. Tiu ĉi sciencisto de la Universitato de Kembriĝo diras, ke Trojo troviĝis inter Londono kaj Kembriĝo. Li diras ke la multaj nomoj de riveroj kaj urboj kiujn menciis Homero, estas retroveblaj en la nuna okcidenta Eŭropo (i.a. Temzo). Ankaŭ ekzistas nur unu lando kie kunfluas tri riveroj, Rejno, Mozo kaj Skeldo. Ĉio estas ekplikebla se oni supozas, ke Trojo estis sur la Brita insulo.

Sed restas la granda demando: ĉu ni kredas tion? Ne estas vera pruvo por iu el la du teorioj.

Ni havis agrablan vesperon kaj lernis, ke oni ne ĉiam konas la veran historion.

Dankon, Jan, pro via interesa prelego.

Kiu faros la sekvontan prelegon. Anoncu vin ĉe Jan Doumen aŭ Henri Schutters.

An Olijslagers

2. Agrabla vespero en Maasmechelen (*Aangename avond in Maasmechelen*)

Por la lasta ĵaŭdo antaŭ la somerferioj ni decidis iri al la kafejo ESPERANTO, Oude Baan 8, 3630 Maasmechelen (Eisden), kie ni jam estis antaŭe, por ludi kartojn kaj kanti Esperantajn kantojn.

La kafejestro, Mustafa Kirmizitoprak, estas granda simpatianto de Esperanto. Li intencas lerni la lingvon.

Por povi kanti kune Jan Doumen kompilis kantlibron enhavantan 46 pli-malpli konatajn esperantlingvaj kantojn kun muziknotoj kaj gitar-akordoj.

Nur ses personoj respondis al nia alvoko, sed la etoso estis ege agreabla. La unuan horon ni ludis kune la kartludon 'jokeron'. Por ke ĉiuj ses povu partopreni en ĝi, ni bezonis tri ludkartarojn! Antaŭe Jan eksplikis la ludon kaj nomis ĉiujn terminojn en Esperanto.

Intertempe oni trinkis bieron aŭ akvon laŭplaĉe. Mustafa ankaŭ regalis nin.

Post tio Paul prenis sian gitaron kaj Jan malpakis sian sintezilon, per kiuj ili akompanis la kantojn. Tiel ni kune kantis i.a. 'Klementin', 'Macky Messer', 'La lingvo por mi', 'La gaja studento', 'Himno de la ĝojo', 'La iamo longe for', 'La Espero'. Post serio de tri kantoj Paul solokantis kelkajn modernajn kanzonojn akompanante sin per la gitaro. Estis tre agrable aŭskulti lin.

Jam estis la dekunua horo nokte kiam ni reiris hejmen en bona humoro... La proverbiaj forestintoj vere malpravis!

Jan Doumen

Membroj de LEA kiuj ŝatus posedi la kantaron de LEA, kiu estas belaspekta sesdekpaĝa libreto en A-5 formato kun plastizita verda kovrilo, povas ekhavi ĝin por la prezo de nur 7,50 eŭroj (inkluzive de la sendokostoj en Belgio). Sendu retmesaĝon aŭ telefonon al Jan Doumen, sekretario de LEA.

Nia lingvo (*Onze taal*)

Delikata punkto en nia lingvo estas la uzo de la akuzativo, kiu finiĝas per -n (nominativo + -n). Danke al ĝi la vortordo en Esperanto estas sufiĉe libera.

A. En la nominativo estas la subjekto, la predikativo kaj la statkomplemento:
La ĉefurbo de Belgio estas Bruselo.

Mia patrino estis malsana.

Petro volas fariĝi kuracisto.

Mi trovis la vinon bongusta.

Senemocia la krimulo aŭdis la juĝon.

B. 1. En la akuzativo estas ĉiu objekto kaj komplemento sen propozicio.

Ĉu vi legis tiun libron?

Kion signifas tiu frazo?

La sekvan matenon ili foriris.

2. Se en frazo estas du objektoj, la persono estas nereкта objekto, la aĵo rekta objekto.

Ni donis donacojn al niaj gepatroj.

Kian aŭton vi aĉetis?

Monon ili ne havas.

Rimarko: Ne prenu adjekton por objekton.

La postan tagon oni retrovis la infanon.

3. Se en frazo estas nur unu objekto kiu estas substantivo aŭ pronomo, ĝi ĉiam rajtas esti en la akuzativo.

Li demandis min, kiu horo estas.

Li demandis al mi, kiu horo estas.

i proponis min (aŭ: al mi) iri al la kinejo.

4. Se prepozicio dependas de verbo kiu esprimas movon aŭ direkton, ĝi estas sekvata de la akuzativo, escepte de *al* kaj *ĝis*, kiuj ĉiam esprimas movon, kaj *de*, kiu esprimas inversan movon.

i venis en la manĝoĉambron.

La reĝo sidiĝis sur la tronon.

Ni iras al Bruselo. Ni iras Bruselon.

Ili promenis ĝis la arbaro.

La infanoj revenis de la lernejo.

5. Ankaŭ adverbo de loko estas en la akuzativo post verbo de movo.

Ni restos hejme dum la ferioj.

Ili iris hejmen / Bruselen / eksterlanden.

Krabo ĉiam movas sin flanken.

Se vi pasigos viajn feriojn en- aŭ eksterlande, sendu bildkarton al la redaktoro kun salutoj kaj impresoj de la loko. Tute ne gravas, se vi jam estis en Peer aŭ ne. Karto ĉiam faros plezuron al ni kaj al la legantoj. La teksto estos publikigita en la venonta numero de 'La Ponto'. Dankon!

